

33

(2/2001)


Membro de la LEA-Komitato de SAT (Parizo)

LEA/G MAGAZINO

Organo de la Libera Esperanto-Asocio por germanlingvaj regionoj
Organ des Freien Esperanto-Bundes für deutschsprachige Gebiete

Inkluzivas la organon
de la Aŭstria Socialista Ligo Esperantista (ASLE) **La Socialisto**

na, sowas!
die vollständige Grammatik
der Esperanto-Sprache auf
5 x 9,5 cm!



ESPERANTO — PLENA GRAMATIKO (Zamenhof, 1887) — VOLLSTÄNDIGE GRAMMATIK:

1 Nur ein bestimmter Artikel: „LA“ Unbestimmter Artikel = Weglassen des bestimmten Artikels.	2 Alle Substantive enden auf „O“. Plural: Anfügen von „J“. Akkusativ: Anfügen von „N“. Genitiv und Dativ werden mit den Präpositionen DE und AL gebildet.	3 Alle Adjektive enden auf „A“, sonst wie bei Regel 2. Komparativ PLI... Superlativ PLEJ...	4 Zahlwörter (undekliniert): unu du tri kvar kvin ses sep ok naŭ dek 100 = cent 1000 = mil. Ordnungszahlen: Anfügen von „A“ (wie Adjektiv).
5 Personalpronomen: mi vi li ŝi ĝi ni vi ili Possesivpronomen: Anfügen von „A“ (wie Adjektiv).	6 Verben enden auf: „AS“ im Präsens, „IS“ im Perfekt, „OS“ im Futurum (Aktiv); zugeh. Partizipien (AIP): „ANTA/ATA, INTA/ITA, ONTA/OTA.“ Passiv: Form v. „sein“ + Passivpartizip.	7 „I“ Infinitivendung „US“ Konditionalsendung „U“ Imperativendung.	8 Nach Präpositionen steht grundsätzlich der Nominativ. Bei Ortspräpositionen besteht Differenzierungsmöglichkeit nach Ort und Richtung entsprechend Regel 13.
9 Jedes Wort wird so gelesen wie geschrieben (= phonetische Schrift).	10 Betonung immer auf der vorletzten Silbe.	7 Adverben enden auf „E“. Steigerung wie bei Regel 3.	12 Es gibt keine doppelte Verneinung.
13 Zur Richtungsangabe wird die Endung „N“ verwendet.	14 Bedeutung von Präpositionen ist eindeutig. Ersatzpräposition „JE“ bei übertragener Bedeutung.	11 Zusammengesetzte Wörter: einfache Verbindung mit Grundwort am Ende.	16 Endvokal von Substantiv und Artikel weglassbar, Ersatz durch Apostroph.
		15 Fremdwörter werden orthographisch angepaßt übernommen.	



Zwischenruf – Interrompa voko

Bald gibt es mehr als 15 EG-Staaten, die elf Sprachen benötigen. Die Iren sprechen englisch, die Belgier außer flämisch (ähnelt der niederländischen Sprache) auch französisch, die Luxemburger französisch und deutsch und die Österreicher die deutsche Sprache.

Der frühere EG-Präsident Delors empfahl den jungen Menschen die Dreisprachigkeit. Jeder sollte neben der Muttersprache noch zwei Fremdsprachen lernen. Was aber, wenn zum Beispiel ein Grieche noch deutsch und italienisch sprechen kann und sich mit einem Portugiesen unterhalten will, der die spanische und die französische Sprache erlernte...? Welcher Hochofenarbeiter, Bergmann oder LKW-Fahrer hat abends nach der schlauchenden Arbeit noch Lust zwei Fremdsprachen zu lernen? Und die EG verpulvert Immense Summen an Steuergeldern für Dolmetscher und Übersetzer. Mir sagte einmal ein Besucher unseres Werbestandes in Duisburg: „Ein Glück, das Esperanto nicht Weltsprache geworden ist.“ Ich: „Wieso?“ Er: „Dann wäre ich arbeitslos. Bin Dolmetscher.“

Die EG könnte sparen, wenn sie die internationale Sprache Esperanto benutzte. „Da könnte ja jeder ‚Hein!‘ bei der EG tätig werden“, meinte ein Dolmetscher.

Albert Stephan

Post ne tro malvasta estonto estos pli ol 15 ŝtatoj en la eŭropa komunumo. Jam nun estas bezonataj „nur“ dekunu lingvoj. La irlandanoj parolas la anglan, belgoj uzas la flandran (similas la nederlandan) kaj la francan, la luksemburgoj la francan kaj la germanan, la aŭstroj la germanan lingvojn.

La lama prezidanto de l'komunumo Delors rekomendis al la junaj homoj esti tri-lingva. Ĉiu lernu apude de la patrino lingvo ankoraŭ du fremdajn lingvojn. Sed kio okazus, kiam ekzemple greko ankaŭ scipovas la germanan kaj la italan lingvojn, kaj emas babilii kun portugalo, kiu lernis la hispanan kaj la francan? Ĉu laboristo, kiu laboras je la altforno, ĉu minilaboristo, ĉu ŝoforo de ŝarĝveturilo emas lerni du lingvojn post la taga stresa laboro? Kaj la komunumo fordlabočas egajn sumojn el impostaj monoj por interpretantoj kaj tradukistoj. Vizitanto de varblando en Duisburg diris al mi: „Feliĉe, ke Esperanto ne estas mondlingvo.“ Mi: „Kial?“ Li: „Tiam mi estus senlaborulo, mi estas interpretisto.“

La komunumo povos ŝpari, kiam ĝi uzos la Internacian lingvon Esperanto. Stop! „Tiam povus labori ja ĉiu simpla homo ĉi ĉe la komunumo“, opinis interpretisto.



Eble por neniu en la mondo nia demokrata lingvo havas tian gravecon kiel por la laboristoj, kaj mi esperas, ke pli aŭ malpli frue la laboristaro estos la plej forta apogo de nia afero. La laboristoj ne sole spertas la utilon de Esperanto, sed ili ankaŭ pli ol aliaj sentas la esencon kaj ideon de la esperantismo. L.L.Zamenhof (1910)

Bastono kun ŝnuro en akvo

(S.K.) Antaŭ nelonge „flirtis“ denove arestordono kontraŭ fuĝinto el Jugoslavio sur la skribtablon de helpanto pri pruvigo, kiu aktivis en germana metropolo. La jugoslavo estis tenanta bastonon kun ŝnuro en akvo. Pro tio li ofendis kontraŭ la leĝo pri fiŝkaptado. En Germanio oni rajtas fiŝkapti nur per hokpermeso.

Kvankam tiu jugoslavo ja ne fiŝkaptas pro komercaj celoj, sed nur por havi aldonan nutraĵon, ĉar la sociala helpo estas malaltigita. En lia hejmlando, de kie li foriris pro vivdanĝera situacio, li estas malriĉa, kaj same kompletigas la necesan manĝaĵon por la tuta familio – sen hokpermeso.

Li pagu 100 germanajn markojn kiel puno. Se li ne povas pagi, li devos anstataŭe trasuferi dek tagojn en malliberejo. Ĉiu tago en la malliberejo kostas la ŝtaton – 200 (!) germanajn markojn, entute, do, 2000.

Tio ne estas sola okazaĵo. Ofte la oficejo pri socialaj aferoj sperdas, ke ekscitite venas punitoj por ricevi la pagendan sumon.

AFS

Eldonanto: Libera Esperanto-Asocio
Renchener Str.47, DE-77704 Oberkirch
Redakcio: Gary Mickle, Berlin
Respondecas pri ĉi tiu eldono:
A.F. Stephan, Oberkirch
Lektoraj laboroj: H. Rodewig, Hanovro
Abonprezo / membreco: 15,- DM/7,5 Euro
Membreco enhavas liveradon de l'organo.
Aperas kvarfoje jare.
Konto: Jiri Proskovec, Dortmund
Nro.9168-434 Postbank Essen
(BLZ 360 100 43)

Paco estas en la koro

Tra la tuta mond' la homoj
Serĉas pacon – sen rezulto,
sur la stratoj – en preĝejoj,
kvazaŭ paco estus kulto.
Tien-reen la serĉantoj
Ĝeme vagas sen espero.
Daŭre, daŭre esplorantoj
Serĉas pacon sur la tero.

La milito diversioke
Bruminacas al popolo.
Atombomboj ŝoke, moke
Ekspiodegis ĉe atolo:
Akcidentoj sur la stratoj,
murdo, rabado, incendio
kaj malpaco inter ŝtatoj
ĝis tutgloba agonio.

Spite de la tumultado,
kiu regas sur la tero,
kaj la aĉa konkurado
incitata ĝis kolero;
se vi mem pacema estas,
ho, ne gravas la angoro,
ĉar por vi la paco restas,
ĉiam daŭre en la koro.

L.R. Stilling



Herta Nlessner, ASLE Vieno, sendis al ni poemon, kiu aperis marto 1997 en la ASLE-organo „La Socialisto”. Ni opinias, ke ĝi valoras esti prezentata en la LEA/G-organo:

„Kio estas la amo?”

Pensoj de Otto Kuttelwascher, Pottschach (Aŭstrio)

Vi renkontadas milojn da homoj, sed ĉiu el iliaj vizaĝoj estas alia en formo kaj esprimo. Tamen, al vi ili ĉiuj aspektas egalaj, kaj vi neatente preteriras ilin en la ĉiutaga maltrankvileco.

Subite neatendite vi rigardas homan vizaĝon kaj vi ne povas deturni viajn okulojn de tiu ĉi bildo. Mirinda varma homeco profunde tuŝas vian animon!

El multaj vizaĝoj ofte al vi renkontas rideto, unu egalas la alian. Ĉiuj ili fariĝas por vi unu sola grimaco de afableco.

Sed iam rideto sur iu homa buŝo ŝajnas al vi kiel brila sunradio kiu subite trairas grizajn nubojn. Ĝojo kaj feliĉo plenigas vian koron!

Ĉiam denove vi aŭdas paroladi la homojn. La multeco de la Voĉoj estiĝas al vi senfina, monotona voĉbruado.

Jen eksonas al vi voĉo de iu homo kiel mirinda melodio el ĉiela heja mondo. Vi deziras eternigi la horon, por ke tiu ĉi belsono neniam perdiĝas!

Se iam unusola homo donacos al vi tian vizaĝon, tian rideton, kaj tian voĉon – tiam vi renkontos la amon!

Kdo. Otto Kuttelwascher + naskiĝis 1906 kaj atingis la aĝon de pli ol 93j. Li estis en sia aktiva tempo vigla kunlaboranto. Ofte aperigis artikolojn pri psikologiaj aspektoj en la ASLE-organo. Radio Aŭstrio dissendis liajn verkojn per mallonga ondo.

Aĉetu SAT-Akciojn!

La ideo, per eldono de akcioj plibonigi la enhavon de la kaso por financi asociajn taskojn, ĉar la kotizoj ne sufiĉas, okupis SAT jam en la jaroj 1923 ĝis 1928. – Slatempe la asocio ofertis SAT-akciojn diversseriajn. Ĉi sube la teksto de la oferto kaj ekzemplo de la AKCIO (malgrandigita).

Hans Jankowski


Celo de la akci-eldono

Kiel ĉiu kooperativo por povi evolui bezonas monon, tielsame ankaŭ la nia. Kion ni faras per ĉimono? Ni eldonas valorajn librojn en esperanto, klujn povas legi ĉiu laboristo en la tuta mondo. Multaj manuskriptoj troviĝas en la manoj de la Plenum-Komitato: por ilin eldoni ni bezonas monon. Ju pli da akcioj estas aĉetataj, des pli ni fariĝas aktivaj en nia entrepreno. Ĝis hodiaŭ ni jam eldonis 37 diversajn librojn. K-doĵ helpu en tiu granda tasko de SAT, por ke ni baldaŭ povu eldoni la 50-an verkon! Cetere, ĉiu povas aĉeti akciojn de SAT, ankaŭ ne-esperantistoj.

Avantaĝoj de akciahavantoj

Ĉiuj pagantoj ricevas akci-biletojn laŭ valoro de la enpagita sumo, kiu estas repagebla 3 jarojn post la dato de la enpago, registrita en niaj libroj, plus 10% de la ĉiujara rento, kiu ne konstante estas elpagata, sed kreditigata per alskribo al la origina sumo. La 10% rento valoras nur por tiuj, kiuj konstante estas posedantoj de la akci-biletoj dum tri jaroj. La akcioj de SAT havas konstantan valoron kaj ne estas tuŝataj per inflacio.

Niaj k-doĵ eĉ povas uzi la akciojn, kiel pagilojn en rilato kun la Administracio por pagi membrokotizojn, abonojn, mendojn ktp.; per tio la membroj kaj abonantoj havas gravajn faciligojn. Ili povas kvazaŭ asekuri sin kontraŭ okaza nepagkapablo en malfavoraj cirkonstancoj. Jam multaj k-doĵ spertis la bonon de tiu akci-aranĝo. (PK)



NIA RAKONTO:

Kato kaj muso

La grafo de *Katzenellenbogen* (*Katokubuto*) dum la mezepoko posedis grandan belan kaj fortikigitan burgon ĉe la Rejnrivero. Li estis tre batalema sinjoro, kaj tre ofte estis for pro grandaj kaj malgrandaj bataloj.

Iam li ree forestis pormilite jam kelkajn jarojn, kaj reveninte dum malhela nokto, li kaj lia militservistaro povis trovi la supreniron al la burgo nur per lumo de torĉoj. La sekvontan tagon frumatene ellitiĝinte li malfermis la dikan lignan fenestrokovrilon por revidi sian hejmlandon. Sed, kio estas tio? En matena sunbrilo li ekvidis sur la monteto vid-al-vido pli malgrandan sed lute novan burgon.

„Ho“, li okkris surprizite, „kiu muso konstruis sian dormeton ĉi tien?“
De post tiu tempo ambaŭ burgoj estas nomitaj: Kat' kaj Muso!



Mi legis tiun rakonton en esperantoskribita libro pri historio de l'Rejn-rivero. Pri la du burgoj mi aŭdis ankaŭ alian rakonton:

Estis en iama tempo du fratoj, kiuj ne ŝatis unu la alian. La pli aĝa konstruis burgon sur monteto super la Rejn-rivero por kontroli la transportojn de varoj sur la rivero kaj enkasigi impostojn. La pli juna frato enviiis al la burgo posedanto la enkason, konstruis sialtanke burgon sur la najbara monteto kaj konkuris pri enkasado de impostoj.

Je unu tago ambaŭ sen scio de la alia pripensis murdi la konkuranton. Kiel ĉiutage ili frumatene malfermis fenestron por kolere rigardi la rivalon. Opiniis la pli juna, ke estus bona okazajo liam murdi la fraton per sagopafilo. Sed saman ideon havis la pli aĝa. Denove ĵo unu frumateno ambaŭ malfermis la fenestrojn kaj pafis samtempo sagon al la alia. Ambaŭ do mortis. Oni povas konstati, ke ili 'amis' sin kiel kato kaj muso.

Stefano

La unuan de majo en Berlin...

ni standumis ĉe Mariannenplatz en Kreuzberg dum kvar horoj. „Ni“ estis kvin gekamaradoj ligitaj kun la *Makdekstra Forumo*, ankaŭ kelkaj aliaj berlinaj esperantistoj kaj unu vizitanto el Darmstadt. Kiel kutime ni vendis kaj disdonis sufiĉe multe da broŝuroj kaj faldfolioj al preterpasantoj. Ĉifoje ni tamen ne aktive disdonis flugfoliojn sur la placo, sed nur al homoj, kiuj venis al la stando. La efikecon oni ne povas bone taksi, sed kun tio ja oni devas vivi.

Mallonge post nia foriro je la 19a horo, komenciĝis akraj stratbataloj kun jetado de pavimeroj unuflanke kaj akvojetiloj aliflanke, kies centro estis ĝuste la Mariannenplatz, al kiu estis polita de la polico tiuj manifestaciantoj, kiuj, se diri la nudan veron, ne malemas al tiaj ekzercoj. La polica taktiko malhelpi ĉiajn kolektiĝojn de homoj en la strato proksime al la placo kompreneble efikis provoke kion ili certe prikaŭkulis. Kiel dirite, ni mem ne estis trafita de la konflikto.

GM

Esperanto lebt

La leterojn ĉi-apude de konataj E-aktivuloj sendis al ni nia membro Margot Welchmann, Dortmund. Ni opinias, ke ili valoras esti reprezentataj en MAGAZINO. La leteroj aperis en „Westfälische Rundschau“ (24.03.2001). Dankon, Margot, por la alsendol

AFS



Betr.: WR-Glosse „Kie ni trovigxas?“

Sie bezeichnen Esperanto als virtuelle Kunstsprache. Wer aber schon einmal an der „Internationalen Woche“ der deutschen Esperanto-Jugend mit mehr als 300 Jugendlichen aus aller Welt teilgenommen hat, der weiß, dass Esperanto alles andere als virtuell ist.

Wer es, wie unsere Kinder, von klein auf gewöhnt ist, hin und wieder mit Chinesen, Afrikanern oder Kubanern am Frühstückstisch zu sitzen, für den ist Ausländerfeindlichkeit kein Thema mehr. Während überall „gegen“ Ausländerhass und Gewalt demonstriert wird, setzen wir Zeichen „für“

Verständigung und Toleranz.

Leider ist diese Tatsache den Medien keine Schlagzeile wert. Wolfgang Loose, Deutscher Esperanto-Bund NRW, Holzwickede

Ihr Kolumnist „zu“ bezeichnet Esperanto als „virtuelle“ Sprache, also als eine, die nicht wirklich existiert. Da irrt er sich, wie ein Blick etwa ins Internet unter <http://www.esperanto.de> zeigt. Ich spreche Esperanto seit fast 30 Jahren, habe Gesprächspartner in aller Welt und bin Lehrbeauftragter für Interlinguistik (Plansprachen, insbesondere Esperanto) an der Universität Münster. Alles nicht virtuell, sondern real. Dr. Rudolf Fischer, Nordwalde

Devizas korespondi

gelnernantoj (7-10j) en Esperanto. Interresuloj bv. sendi leteron al:
Teresa KONSEK (la Instrulistino)
Szkola, Podstawowa nr 34
ul. Reymonta 69 PL-44-200 Rybnik (Poljo)
Teresa K. serĉas ankaŭ diversan Instrumaterialon (kantetoj, fabeloj) por plibonigi la Instruadon.

LA AMIKECA RETO

proponas alian turismon... amikoj en la tuta mondo pretas diskuti, kuneagi, vizitiĝi siajn vivejojn.. abono: 25,-DM/13 Euro.
La retolisto havebla ĉe G.ROLLIN
88 rue Victor Hugo, FR-37400 Ambolse
>Vi povas ĝiri al Franz KNÖFERL <
Ritter-Gerold-Str.28, 85302 Geroltsbach
(L) Informos vin pri la kontoj!

Die DEUTSCHE ESPERANTO-JUGEND
Grellstr.36, 10409 Berlin (Tel:030-4285789)
- Internet: <http://www.Esperanto.de> - hat einen Informationsprospekt über die Internationale Sprache Esperanto herausgegeben.

ILUSTRITA HISTORIO

de l' Laborista Esperanto-movado
(Illustrierte Geschichte der Arbeiter-Esperanto-Bewegung) Esperanto/deutsch,
broŝiurto, 10,-DM/5 Eu. Inkl. Versandkosten, gegen Rechnung beziehbar beim Freien Esperanto-Bund, Renschener Str.47
77704 Oberkirch (Baden)

SVISA ESPERANTO-SOCIETO

Informilo-Red.: Claude GACOND. Poŝtfako
5031, CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5, aranĝas E-kursojn. Vi povas veturi tien kaj partopreni. Informojn ĉe Claude Gacond.

Kaŝitaj vortoj – Versteckte Wörter

En la literoj estas kaŝitaj dudek (20) vortoj el la Internacia Lingvo Esperanto. Ĉi tiuj vortoj staras horizontale, vertikale, diagonale, parte koincide kaj ankaŭ returne. Bv. marki ĉiun trovitan vorton. Jen ekzemplo, la vorto: paco.

La resto de l' literoj montros, se vi legos ilin sinsekve, la nomon de monda asocio. – In den Buchstaben sind zwanzig (20) Wörter der Internationalen Sprache Esperanto versteckt. Die Wörter können horizontal, vertikal, diagonal, auch von rückwärts gelesen im Diagram stehen und andere Wörter überschneiden. Bitte die gefundenen Wörter markieren. Beispiel: paco.

Die übrig bleibenden Buchstaben ergeben Reihe für Reihe gelesen den Namen einer Esperanto-Weltorganisation.

Ni deziras bonan sukceson – wir wünschen guten Erfolg!

Via enigmo-onklino

S	E	N	N	A	V	E	R	D	A
C	M	A	I	K	I	E	A	I	E
O	V	I	T	O	M	C	N	A	F
N	N	K	S	T	E	L	O	R	O
I	N	O	D	I	N	O	B	A	H
Z	L	A	S	Z	S	O	O	N	C
A	E	B	I	O	C	O	N	T	E
G	R	E	U	A	E	S	T	I	M
A	N	L	P	A	G	E	N	D	A
M	I	A	T	M	O	N	D	A	Z

aboni, bela, bona, doni, esti, kia, kiam, kie, kotizo, lerni, magazino
mia, motivo, oni, oro, paco, pagenda, sono, stelo, verda,
Zamenhof

Internacia Tago la 20-an de oktobro, 2001, en Gent
Organizas la Esperanto-Grupo „La Progreso“
Informas: Jakvo SCHRAM, Hof ter Bekestr.49, BE-2018 Antwerpen

Prusio ne allogas

de Roland Schnell

La regantoj ordonis jubladon. Berlino kaj Brandenburgio festu 300-jaran datrevenon. Ĉie okazu ekspozicioj, konferencoj kaj koncertoj honore al historia evento. Tricent jarojn antaŭ la jaro 2001 la tiama Kurfürst¹ Friedrich III iĝis «reĝo en Prusio» per pompa ceremonio en Königsberg, la hodiaŭa Kaliningrad. La reĝlando Prusio nun estu prezentata kiel kernoregiono de eŭropa civilizacio kaj monda kulturo, de progreso kaj toleremo.

Aliloke en la mondo oni konservis alian bildon. Enketoj en diversaj eŭropaj landoj, en Japanio kaj Usono montris, ke tie la vorto «Prusio» elvokas ideojn de «militŝtato kaj ekspansio», de «ordo kaj devoj». Fakuloj pri turismo tial mal-konsilis uzi la temon «Prusio» en la reklamoj por vojaĝoj al Germanio kaj al Berlino.

Kiel pruvon de la toleremo de la «granda reĝo» rilate al religioj kaj etnoj oni kutimas citi la frazon «En ĉi tiu ŝtato vivas katolikoj, luteranoj, reformitaj, judoj kaj multnombraj aliaj sektoj, kaj ili pace vivas kune». Pri la motivoj de la toleremo estas silento. Reĝo Friedrich II, la «tolerema despoto» timis, «ke ekestos partioj kaj febraj kvereloj, ke komenciĝos persekutoj, kaj ke la persekutataj kredantoj forlasos la landon kaj riĉigos la najbarajn landojn per sia nombro kaj laboremo. [...] Dum ĉiu kulto estas libera, ĉiuj restas trankvilaj».

La prusa toleremo estis ilo por plenumi la kazon de la ŝtato, kiu bezonis monon por pagi la soldulojn, bezonis fabrikojn

¹ Kurfürst estis «princo-elektanto», i.e. princo rajtigita partopreni la elektadon de la germana reĝo.

kaj evoluintan teknikon por produkti armilojn.

Speciale pri la judoj la reĝo skribis: «La judoj apartenas inter la diversaj religioj al la plej danĝera, ĉar ili malhelpas la komercon de la kristanoj kaj ili estas malutilaj por nia ŝtato. Tamen ni bezonas ĉi tiun popolon por certa komerco kun Pollando. Estas evitende, ke ilia nombro kresku, kaj oni devas zorgi, ke ili restu etaj komercistoj». Kiam en certa loko la nombro de judoj superis la fiksitajn nombrojn, devis okazi «la eksigo de la plej malriĉaj kaj maldecaj» judoj. Tion la reĝo persone ĉiujare kontrolis.

En letero al sia eldonisto Nikolai la filozofo Gotthold Ephraim Lessing taksis la «toleremon» jene: «Ĝi reduktigas senescepte al la libereco laŭplace publikigi stultaĵojn kontraŭ la religio [...] se en Berlin iu levas sian voĉon kontraŭ ekspluato kaj despotismo, kiel okazas nun en Francio kaj Danlando, vi baldaŭ spertos, kiu lando ĝis hodiaŭ estas la plej sklaveca de Eŭropo».

Winkelmann, fondinto de la klasika arkeologio, diris «Estas pli bone esti circumcidita turko ol pruso» kaj fuĝis kiel Herder, Klopstock, Wieland kaj multaj aliaj intelektuloj. Rilate al Immanuel Kant, kiu vivis en la prusa urbo Königsberg, rimarkis Moses Mendelssohn «Platono vivas en la lando kaj la reĝo ne konas lin».

La celo de la prusa ŝparemo estas ebligi militadon. Tiurilate, la prusa virto de humaneco estas videbla en sekreta ordono de la lasta germana reĝo al la kuracistoj, kiun malkaŝis la brita historiisto Sir James Harris «Li donis la ordonon toleri la morton de vundita

soldato anstataŭ pligrandigi la nombron kaj la kostojn de invalidoj».

La historio de Prusio estas per sango skribita en la libro de la historio. Dum du kaj duona jarcentoj la enloĝantoj de prusa teritorio suferis sub la militemo de la estroj. La dissolvado de Prusio post la 2-a mondmilito estis komprenebla ago.

Bedaŭrinde, tio makulas la memoron al tiuj, kiuj respondecas pri la nomo. La vorto «Prusio» devenas de hindeŭropa gento, parenca al la litova, kiu vivis apud la balta marbordo. Oni diras, ke la prusoj estis aŭdacaj militistoj, teruraj kontraŭ siaj malamikoj, sed tre gastamaj

al pacaj fremduloj. Ĝis la jaroj 1215 ili sukcesis rezisti kontraŭ ĉiuj provoj de kristanigo. Ili povis defendi sian landon kontraŭ la atakoj de la «Germana Ordeno» ĝis la katolika eklezio vokis al granda «kruca militiro» kontraŭ la obstinaj paganoj. 60.000 venis el la tuta Eŭropo kontraŭ absolvo de ĉiuj pekoj. Koloniistoj estis allogataj el la okcidentaj landoj kaj fondis la urbon, kiu poste estis Königsberg.

Vere plorinda, ke la nomo de la bravaj prusoj travivis kiel simbolo de fiago de siaj konkerintoj.

Parolado de *AKTION 3. WELT Saar* dum la manifestacio kontraŭ la Castor-transporto de La Hague al Gorleben (Agado Tria Mondo Sarlando) sabate, la 24-an de marto 2001 en Kehl (El la mesaĝo "Sennacia parolado plivastigenda!" de Roland Schnell de 2001-04-08)

Naciaj limoj utilas al akciaj kurzoj Kontraŭnuklea movado por aliaj limoj

La sama federacigermana polico (*Bundesgrenzschutz*), kiu tratabos, se necesas perforte, la transporton de la Castor-kontenero, estas ĉe la franca landlimo por bari kontraŭ rifuĝintoj la vojon al pli favora futuro. Dum la Castor-konteneroj nehaltigate povas trapasi la limon, ĝi estas fermita por la rifuĝintoj, kiuj fuĝis antaŭ siaj ekzekutistoj kaj esperas pli bonan vivon en Eŭropo. Tial estas pli ol ironio de la historio, ke la triangulejo kun la urboj Schengen sur la luksemburgia flanko, Perl sur germana, kaj Apach sur franca flanko iĝis la scenejo de la tiel nomata "Traktato de Schengen", la kontrakto, kiu sigelis la fortikajon Eŭropo. Tie troviĝas ankaŭ Perl-Apach, la ĉefa limtrapasejo de la Castor-transportoj. Jam in 1997 tie okazis grava akcidento, dum kiu unu Castor-vagono elreliĝis. Rifuĝ-

intoj, kiuj estas nek utilaj por la franca nek por la germana ekonomio, ekzemple pro la manko de komputilaj spertoj, estas kun la plena ŝtata severeco forpelataj de la eksteraj kaj internaj limoj de Eŭropo, arestitaj kaj forpuŝataj.

Protestante hodiaŭ kontraŭ la Castoroj, ni protestas ankaŭ kontraŭ la principo de maksimumigo de profitoj, kiu estas malantaŭ ĉio. La maksimumigo de profitoj, kiu taksas la ekonomian profiton pli alta ol la vivo de homoj. Ankaŭ ni, la kontraŭnuklea movado, estas por limoj. Por limoj kontraŭ la libera fluo de kurzoj de akcioj. Por limoj, kiuj savas valorojn, kiel fratecon kaj solidarecon. Ni scias, ke ĉi tiuj valoroj nek rezultigas ekonomian profiton, nek estas vendeblaj. Des pli diligente ili estas savendaj. La kontraŭnuklea movado ne havas patrion kaj "nacion" res-

pondecon. Se temas pri la maksimumigo de profitoj, neniu slogano estas tro stulta por esti uzata, neniu fuŝo de vortoj tro embarasiga por ne esti publikigata:

La garantio por la daŭrigo de ĝia funkcio estas "eliro el la atomenerĝio". La malplenigo de la stokokapacito de La Hague estas "nacia respondeco". Per apelacio al la "nacia respondeco" Gerhard Schröder kaj la partio "Bündnis '90/Die Grünen" postulas de ni doni trapason al la Castor-transportoj.

Geamikoj! Kiel kontraŭnuklea movado ni estis kaj estas fieraj pri la fakto, ke ni estas senpatriaĵ fiuloj. Ni ne havas patrion kaj ni ne fieras pri tia, ni ne interesiĝas pri la bonfarto de la patrolandaj akciaj kurzoj kaj de la registaroj. La ruĝverdaj patriaj registaroj en Parizo kaj Berlino ĉiukaze estas beno por la atomindustrio en ambaŭ landoj. Por atomindustrio, kiu estas grandskale internacia. Oficiale oni parolas pri eliro el la atomenerĝio, sed la realeco estas, ke en Germanio oni ĝis nun nenium atomcentralon malŝaltis. La brita verkisto George Orwell precize priskribis ĉi tiun distordon de vortoj. La bela termino

"nacia respondeco" estas prenita el la profundo de la politikhistoria tineo-skatolo. Ĝi kaŝu, ke en la kazo de germana atomrubajo ne temas pri la malŝalto de atomcentraloj, sed pri la daŭrigo.

Per la danĝera termino de la "nacia respondeco" la ruĝverda koalico provas imputi kvazaŭ biologian, naturan leĝon. Sed la funkciado de atomcentraloj ne estas natura leĝo, sed dependas de la politika volo. Nek ekzistas natura leĝo kiu kontraŭas la malŝalton de atomcentraloj, nek ekzistas leĝo, krom la leĝo de maksimumigo de profitoj.

Ne indas havi iluziojn. Kiam oni provokas en Germanio tiajn naciajn mitojn, la registaro pretas pluiri. Senpatriaĵ fiuloj ne ĝuas komprenon en la oficiala Germanio.

Tial:

Ne al la nuklea maksimumigo de profitoj.

Jes al malfermitaj limoj por solidareco kaj frateco.

tradukis Roland Schnell

Tia estas la mondo

Esperantigis: Manfred Ratislavo (Manfred Retzlaff, Stettiner Straße 16, DE-59302 Oelde) en Oktobro de 1990 laŭ la origina germanalingva teksto.

Tia estas la mondo

Se vi havas multon, vi Baldaŭ ekposedos plion.
Se malmulton havas vi,
Oni prenos ankaŭ tion.

Lasu entombigi vin,
Se vi havas, alĵ, nenion –
Ĉar vivrajton havas nur
tiu, kiu havas ion.

Verkita de la poeto Hejno, Henriko (Heinrich Heine, 1798 - 1856).

Weltlauf

*Hat man viel, so wird man bald
Noch viel mehr dazubekommen.
Wer nur wenig hat, dem wird
Auch das wenige genommen.*

*Wenn du aber gar nichts hast,
Ach, so lasse dich begraben –
Denn ein Recht zum Leben, Lump,
Haben nur, die etwas haben.*

Origina germanalingva teksto de Heinrich Heine (1797 - 1856)

Recenzo

Zofia Banet-Fornalowa: *La familio Zamenhof*. Eldonis: Kooperativo de Literatura Foiro, La Chaux-de-Fonds, 2000; 226 paĝoj

Konvinkaj kialoj parolis por la publikigo de libro ĝuste pri la Zamenhof-familio. La aŭtorino ilin resumas jene:

- Kompreni la medion, el kiu devenis Zamenhof, helpas kompreni liajn idealismon kaj persiston ĉe la kreo de la lingvo kaj ĝia movado.
- La familianoj mem, edukitaj surbaze de klerismo, apartenis al la plej progresema parto de la socio. Ĉiuj engaĝis sin en aktivadoj favore al socia justo.
- La familianoj mem estis signifaj kaj influaj en siaj medioj.
- Ili apogis plenkore la homaranisman idealon de d-ro Zamenhof kaj energie plulaboris tiusence en la movado dum la intermilita periodo.

La libro konsistas el biografiaj portretoj de L. L. Zamenhof, lia patro, lia edzino, liaj gefratoj (plus ties posteularo) kaj aldonaj genealogia arbo, varsoviaj mapoj (1940-44: la geto), konkludo kaj postparolo de la aŭtorino.

Kvankam multaj originalaj materialoj perdiĝis en la flamoj de la Varsovia Getto, la aŭtorino akribie elserĉis kaj uzis tiujn, kiuj estas nun troveblaj. Ŝi liveras fundamentitan historian scion pri multaj ĝis nun pli onidireco konataj eventoj en la frua historio de nia lingvo. Ŝi korektas ekzemple la legendon pri la bruligo de la lingvoprojektaj manuskriptoj fare de Marko Zamenhof.

La vivo de Zamenhof kaj lia familia medio ne estas temoj, sur kiuj kolektiĝis polvo kaj bezonas interesi nur la historiemojn. Legante, ni pli bone ekkomprenas la sencon, kiun la «interna

ideo» havis por la unua generacio de esperantistoj, kaj kial tiu pensaro, kiun nuntempaj lingvanoj ofte malŝate taksas sekteca kaj verdverda, algrade aktualis en sia epoko. En la 20aj jaroj, Klara kaj Leono Zamenhof kaj aliaj familianoj strebis rekunigi tiun «internan ideon» kun la simpla disvastigado de la lingvo, perceptinte jam en tiu epoko, ke ili sufiĉe apartiĝis. Tion ili faris interalie per la fondo de *Konkordo*, societo por la disvastigo de la zamenhofaj homaranismaj ideoj, kun propraj grupoj en Varsovio kaj kelkaj aliaj urboj. Ĝia sidejo estis la zamenhofa hejmo. Ne temis pri ia mistikajo, sed pri reago al senprecedenca ondo de naciismo en multaj landoj. *La familio Zamenhof* proksimigas al ni kaj tiun medion, en kiu estiĝis Esperanto, kaj tiun, en kiu ĝia movado maturiĝis.

novajoj

Esperanto en Direkte Aktion

Aperis en n-ro 144 (2001 marto-aprilo) de la FAU-organo *Direkte Aktion* sub la titolo *ne lingua franca für alle Linken und Einwanderer* («Interlingvo por ĉiuj maldekstruloj kaj enmigrintoj») artikolo pri Esperanto, kiun temon ĝi enkondukas per kelkaj versoj el kanto de la hiphopa bando «Freundeskreis Esperanto». Ĝi krome raportas pri SAT, LEA, la Liberecana Frakcio de SAT kaj LERT, kaj mencias la eventualan eblon – okaze, ke troviĝos kunlaborpretuloj – de nova regula Esperanto-rubriko en DA. (GM)

Ĉu la haŭto estas vesto?

Estas sciata, ke inter la animaloj la homa specio distingiĝas per apartaj trajtoj, eĉ privilegioj: la vertikala pozicio, la parolkapablo, la pli granda cerbo-kapacito kaj aliaj specifajoj. Inter tiuj lastaj oni povas noti la rolon de la korpa haŭto.

Ĉe ĉiuj aliaj specioj haŭto servas ankaŭ kiel vesto, protektilo. Estas vere, ke ĉe ili – ĝenerale – tiu haŭto estas pli dika kaj abunde kovrata per densa haramaso, felo. Sed ĉe homo la haŭto – ne tiom kovrita per haroj – ne povas ludi la saman rolon kiel ĉe aliaj specioj, kaj eĉ la plej harplena viro ne povas konkurenci kun aliaj animaloj. Tamen necesas agnoski, ke ĉe kelkaj specioj, kiuj kutime vivas en varmaj landoj, la hararo fariĝas superfluaĵo, kiun ili ŝatus forigi.

Koncerne homon montriĝas, ke en nordaj landoj la haŭto ne sufiĉas anstataŭigi la vestojn – almenaŭ dum parto de la jaro – dum en aliaj, pli varmaj landoj la vestoj rolas pli kiel galanterioj ol kiel necesajoj.

Certe dum la jarcentoj, kiam la vestoj fariĝis normalaj kovbriloj, ili enŝoviĝis kiel ŝajna necesajo por klarigi la fakton, ke kutime oni ne plu konsideris en socio haŭton kiel sufiĉan protektilon, kaj oni devigis la homojn sin vesti ne plu por ŝirmi sin kontraŭ frosto, sed por konformiĝi al socioj reguloj plejofte influataj de eksteraj kriterioj.

NATURISTA VIVO



Malfermata tago en naturistejo:

Vidu, mi sentas min sufiĉe nuda sen povi legi miajn ret-mesaĝojn...

Se pelto sufiĉas en nordaj landoj, en meztemperaturaj kaj varmaj landoj vestoj ludas multe pli buntan socian, ekonomian rolon. La vestoj povas esti linaj, kanabaj, lanaj, kotonaj, silkaj, artefaritaj, fibraj, arteksitaj kaj farbitaj. Kaj estas tre gravaj la industrio, merkato, modo, signoj, markoj de la vestaĵoj, kiuj montras ankaŭ la riĉecon. Eleganteo, allogeco laŭ la tajlado, la diversaj prezentoj, fendoj, fenestroj, fantaziaj, sugestivaj aperturoj, dekoltoj... vestoj aperas pli kiel distingilo ol kiel necesajoj.

(Daŭrigo de paĝo 13)

Krome rimarkindas, ke en ĉiuj landoj la leĝoj en normalaj cirkonstancoj devigas la individuojn sin vesti en publikaj lokoj. Tiel, laŭ tiuj trudoj klujn malplimulto konsideras kiel atencon kontraŭ la „libereco“, vestoj fakte anstataŭas la naturan rolon de haŭto. Tial ĉie (krom en specialaj apartaj, ofte fermitaj lokoj) nudeco estas severe malpermesata.

La praktikantoj de sovaĝa nudeco estas kulpigataj je perversado kaj provokado kontraŭ la „bonaj moroj“. Kiam ili estas „kaptitaj“, plej ofte pro denuncado, ili estas konsiderataj kiel danĝeraj mensaj malsanuloj.

Mi ŝatus, ke la legantoj skribu pri tiu ĉi situacio en diversaj landoj kaj mi verkas artikolon por la sekva numero de NV por priskribi la situacion en Francio.

Roger Colney (Francio)



(La artikolon ni legis en la oficiala organo de INOE - Internacia Naturista Organizo Esperantista - p. adr. Jozefo NÉMETH, IHÁSZ, Fő u. 41/5, HU-8531
Retadr.: jozefo@nl-papa.hu



74-a Kongreso
de S.A.T.

14.07.-20.07.2001
en Nagykanizsa, Hungario

Organiza Kongresa Komitato (OKK):

Prezidanto: Tibor SZABADI, PF 66, HU-8801 Nagykanizsa.

retadreso: <esptibor@pro.hu>, Tel. +36.93.314.377.

Sekretario: Béla KOVACS, Béla kiraly u. 44, HU-7400 Kaposvár.

Düsseldorf esploras Esperanto-historion

Okaze de du Esperanto-jubileo (en Düsseldorf en la jaroj 2001 kaj 2002 (1907 – fondiĝo de la neŭtrala/burĝa grupo kaj 1911 – fondiĝo de la laborista grupo) la Esperanto-Societo Düsseldorf Intencas aperigi profestan publicacion pri la historio de la Esperanto-movado en Düsseldorf.

La planita publicaĵo konsistos el la jenaj partoj:

- Ĝenerala historio de la Esperanto-movado ekde la komenco, kiu inkluzivas la historion de Esperanto en Düsseldorf;
- Raportoj pri gravaj Esperanto-eventoj en Düsseldorf (ekz. 25-a SAT-kongreso 1952, 43-a Germana Esperanto-kongreso 1965);
- Raportoj pri Esperanto-aktivuloj en kaj el Düsseldorf;
- Fotoj, dokumentoj k.t.p.

Ni planas prezenti nian „verkon“ dum la REVELO-tago printempe 2002 kaj jam dum REVELO 2001 maje ni volas alvoki ĉiujn Esperantogrupojn en Nordrejn-Vestfalia ankaŭ esplori kaj dokumenti la historion de siaj grupoj. Rezulton povus esti publicaĵo pri la historio de Esperanto en Nordrejn-Vestfalia.

Ellaborante la historion de Esperanto en Düsseldorf ni trovis – krom la neŭtrala kaj laborista grupoj – ankoraŭ aliajn grupojn (en UEA-jarlibroj), kiel ekz. katolikan grupon (1921 – 1925),

grupon „Verda stelo“ (1919 – 1925) kaj ankaŭ akademian Esperanto-rondon (1930), sed bedaŭrinde ĝis nun ni ne povis trovi ion pli detalan pri tiuj ĉi grupoj.

Ni i.a. jam havas kontakton kun la Fritz-Hüser-Instituto en Dortmund, kun la biblioteko „Hector Hodler“ de UEA en Rotterdamo, kun la biblioteko en Aalen, kun la urba arkivo en Düsseldorf kaj ankaŭ kun diversaj iamaj Düsseldorfanoj, kompreneble ankaŭ jam multfoje uzis la interreton por trovi materialon.

Eble la legantoj de „Esperanto aktuel“ kaj la LEA/G MAGAZINO scias ion, kio povus helpi al ni. Ni ankaŭ estus tre dankemaj, se iamaj anoj de Esperanto-grupoj de Düsseldorf povus subteni nin en nia laboro.

Esperanto-Societo Düsseldorf
Edeltraut Mattusch

(Ni subtenas kompreneble la aktivecojn de sinjorino Mattusch kaj jam liveris tekstojn kaj fotojn. Ni timas, ke kelkaj fotoj ne taŭgas por reprodukti. Pro tio ni petas la LEA/G-membrojn trarigardi eblajn proprajn arkivojn, trovi fotojn de Pillekamp, Bartelmes k.a., de la kongreso 1952 kaj tekstojn.

Bv. sendi ĉion al:

A.F. Stephan, Renchener Str. 47,
(DE) 77704 Oberkirch (Baden)
Antaŭdankon! AFS

paĝoj de la Aŭstria Socialista Ligo Esperantista (ASLE)

La Socialisto

Sieger und Sprachen Venkintoj kaj lingvoj

Erster Teil

Das Sprachenproblem ist durch Edmond Privat in seinen zwei Büchern „Das Leben von Zamenhof“ und „Die Geschichte von Esperanto“ auf eine umfassende, weit in die Urgeschichte zurückreichende Weise geschildert worden. Diese Darstellung hat mich sehr berührt. Sie hat gezeigt, wie auch in alter Zeit die Veränderungen zwar langsam aber doch unerbittlich über die Völker, Staaten und Sprachen hereinbrachen.

Schon die Entdeckung der Sumerer war interessant. Ihre Sprache war 1000 oder sogar 2000 Jahre vorherrschend. Dann kamen Eroberer und verbreiteten ihre Sprache (die Assyrer) und das für die nächsten 1000 Jahre. Und dann kamen die Akadier (von denen ich vorher noch nie gehört hatte) und brachten ihre Sprache mit, bis wir endlich zu den Griechen kamen, die weitreichende Einflussgebiete in Kleinasien und bis nach Indien hatten. Dieser weitreichende Einfluss der griechischen Sprache wurde jedoch ebenfalls nach langen Jahrhunderten abgelöst durch die römischen Eroberer, deren Sprache in ganz Europa zur führenden wurde. Noble Gallier ließen ihre Kinder lateinisch erziehen, wie ein Chronist tadelnd erwähnte.

Unua parto

La lingvan problemon priskribis Edmond Privat en siaj du libroj "La vivo de Zamenhof" kaj "La historio de Esperanto" laŭ maniero ĉiufanka, ampleksanta epokojn ekde la frua prahistorio. Tiuj priskribo tre kortuŝis min. Ĝi montris kiel jam en praa tempo la ŝanĝoj superŝutis la popolojn, statojn kaj lingvojn, kvankam malrapide, sed tamen malindulge.

Jam la malkovro de la sumeroj estis interesa. Ilia lingvo estis superregadum 1000 aŭ eĉ 2000 jaroj. Poste venis konkerantoj (la asiroj) kaj distigis sian lingvon, kaj tio por la sekvantaj 1000 jaroj. Kaj poste venis la akadoj (pri kiuj mi antaŭe neniam aŭdis) kun sia lingvo, ĝis ni fine venis al la grekoj, kiuj havis vastajn influosferojn en Malgranda Azio kaj ĝis Hindio. Sed tiun vastan influon de la greka lingvo same post longaj jarcentoj anstataŭis la romiaj konkerantoj, kies lingvo fariĝis la supera en Eŭropo. Noblaj galioj edukigis siajn infanojn latine, kiel kronisto menciis mallaŭde.

(Daŭrigo – paĝo 19)

Raporto de la Estraro

Aktivecoj Estraro kaj aktivuloj aktivis en la raporta jaro 2000 laŭstatute, sed bedaŭrinde ne tro sukcesriĉa. Al diversaj interresuloj ni sendis varbilojn (*Informo pri LEAG k. SAT*) aldoninte ekzemplerojn de *MAGAZINO* kaj de *SENNACIULO*. Kelkfoje, kiam ni opiniis estus taŭga, ni aldonis al la varbilo ankaŭ ekzempleron de la katalogo de la Fritz-Hüser-Institut, Dortmund, *„Ilustrita historio de la laborista Esperanto-Movado“*.

Krom tio ni povas ĝoje informi, ke membroj kaj simpatiantoj de la fratorganizo *ASLE* (Vieno) akceptis nian proponon per ne tro altaj elspezoj aboni la *LEAG*-organon. Laŭdezire *ASLE* povas regule disponi pri paĝoj por ties informoj k.a.

Membraro, abonantaro

En la jaro 2000 fluktudis la nombro de la membroj kiel en antaŭaj jaroj: 12 ekŝiĝis (ne pagis kotizon), 2 ŝanĝis loĝejan adreson, sed ne informis pri la nova, 6 ricevis varbilon, sed ne plue reagis.

Fine de la jaro estis la stato jene:

- 58 membroj (inkl. famillanoj)
 - 14 abonantoj (inkl. eksterlandanoj)
 - 36 aliaj legantoj (interŝanĝe k.a.)
 - 73 *ASLE*-abonantoj (t.a. la lokaj socletoj de l'SPÖ)
 - 7 *SAT*-konsilantoj
- Entute: 188

MAGAZINO k. adresaro

La asocian organon *MAGAZINO* sperte redaktas *Gary Mickle*, Berlin, parte subtenataj de *Hans Rodewig*, Hannover, kaj *Albert Stephan*, Oberkirch. Tekstojn ellaboris la menciitoj kaj liveras ankaŭ legantoj. La redaktoro verkis varbcele germanlingvan *INFO-BEILAGE* pri Esperanto kaj la asocio. *ASLE* ensendis materialon kaj fotojn.

La organo resp. bulteno aperas kvarfoje jare en amplekso de 24 paĝoj. (Abonprezo 15,- DM aŭ 7,60 Eŭ, membro-kotizo entenas la abonon). Nur en la raportjaro ĝi estas eldonita trifoje (eldono 31 = 36paĝa) ĉar la preparo de la adresaro ne lasis sufiĉe da tempo por eldoni kvar ekzemplerojn. Ankaŭ elspeza limigo postulis tian procedon.

La estraro estas informita pri la propono de *Stephan*, reveni al la formato de l' iama *La Libera Esperantisto*, DIN A4. Intertempe superregas en la redakcio, la opinio daŭrigi per la ĝisnuna formato (DIN A5), por eviti ekspedmalfacilaĵojn, kvankam la plimulto de la estraro subtenas la formatŝanĝon.

Krom tio *Stephan* proponis ŝanĝi la titolon jene: *MAGAZINO*, ĉar certe estonte *LEAG* estos unu de l'asocioj, kiuj uzos intensive la interretajn eblecojn.

LEAG posedas interret-adreson: <http://home.germany.net/~101/121591/leag/magazino/index.html>

La *adresaro* enhavas enkondukon, historion de la Laborista Esperantomovado kaj de LEA/G, informojn pri la nuntempa asocia estraro, LEA/G-detalojn, informojn pri SAT kaj la turista asocio *La Naturamikoj*. – Sur 11 paĝoj aperas nomoj kaj adresoj de la membroj kaj simpatiantoj. Krom menciataj estas la asocioj kaj entreprenoj, al kiuj ni ekspedas nian organon ĉu interŝanĝe ĉu inform- kaj/aŭ arkivcele. Ekemple ricevas ĝin *ORF-Aŭstria Radio en Vieno, Radio Polonia, Varsovio, Radio Pekino* k.a. Ilia Esperanto-sekcio ofte publikigas tekstojn el *MAGAZINO*. Ni sendas la organon ankaŭ al la *Fritz-Hüser-Institut für deutsche und ausländische Arbeiterliteratur*, al *Esperanto-muzeoj* kaj aliaj.

Kiel kutime nia asocio bone kunlaboras kun SAT. LEA/G financas la elspezojn de la SAT-peranto en Germanio.

Libroservo. Tion prizorgas niaj membroj *Manfred kaj Consuelo Führer, Eschborn, kaj, Rolf Beau, Althen*. Eldonaj de la Hüser-Institut estas haveblaj ĉe: *Albert F. Stephan, Oberkirch*.

Kvankam la jaro 2001 jam aĝigis pli ol tri monatoj ni deziras al ĉiu bonan sinsekvon de la jaro, sanon kaj feliĉon.

Oberkirch, aprilo 2001

Por la estraro:
Albert Stephan

FINANCRAPORTO por l'jaro 2000

Enspezoj	DM
Bonhavaĵo el 1999	997,41
Kotizoj k. donacoj	3286,60
Vendo de libroj pere de UEA	17,90
Entute:	4301,91

Elspezoj	DM
<i>MAGAZINO</i> preparoj kaj Ekspedoj (inkl.adresaro)	1355,53
Kostoj poŝtbank-konto	110,--
Aĉeto de ekspozici-katalogoj de la Hüser-Institut	290,--
Kotizo al LEA-Komitato de SAT	30,--
Administraj kialoj k. varbado (inkl.elspezoj por la SAT-peranto)	495,16
Entute:	2280,69

Nova saldo: 2021,22

Dortmund, 2001.01.05.

K.H.Kerstling Jiri Proskovec
Hans Jankowski (kasisto)
(revizoroj)

La revizoroj proponas senŝarĝon de la estraro-

Dank'al grandanimaj donacoj flanke de la membroj kaj simpatiantoj eblas ĉi-jare plenumi asociajn taskojn. Specialan dankon al kamarado *Scheffler, Oberhausen*, pro la ĉiujaraj grandsumaj donacoj.

A.F.Stephan

Schließlich kamen die neuzeitlichen Sieger und ihre Sprachen, zunächst die Spanier in Amerika und die Franzosen in Europa. Selbst der Preußenkönig sprach und dichtete französisch und hatte Voltaire lange Zeit an seinem Hof.

Jetzt sind wir bei Anglo-Amerika gelandet und dem Vormachtsanspruch ihrer Sprache. Ihre wirtschaftliche, technisch-militärische Übermacht ist die Grundlage dafür.

Wird fortgesetzt...

Pola Radio, Varsovio,

tre afable priparolls kaj la *SLEA-Infomillon* kaj la *MAGAZINO-n* en sia elsendo de la 1a de majo. Estis mardo, do, la tago, en kiu ĉiam prezentigas la „Trarigardo de la Esperanta gazetaro“. Ili menciis, laŭ nia memoro, la flugfoliotekstojn kaj la recenzon de la libro de Jelloun. GM

Du musoj ...

renkontigas en lu kelo. Demandas la unu:

„Kion vi fartas?“

„Ho, bone, mi estas denove enamigite.“

„Ĉu denove al vesperto?“

„Ne, ne, mi forlasis la monstron, ĉar li certigis al mi esti piloto.“

Estimata leganto, bv. permesi, ke ni atentigas al la pago de la kotizo resp. abonprezo. Kiam vi ne pagis ĝis nun, ni opinios, ke vi ne plu ŝatas membrecon/abonon! Ni kompreneble bedaŭros, ekslistigi vin. LEA/G-Estraro

Fine venis la novtempaj venkantoj kaj siaj lingvoj, unue la hispanoj en Ameriko kaj la francoj en Eŭropo. Eĉ la prusa reĝo parolis kaj versis france kaj havis la poeton Voltaire sur sia kortego dum longa tempo.

Nun ni atingis la anglo-amerikanojn kaj la pretendon pri supereco de ilia lingvo. La bazo de tio estas ilia supereco ekonomia, teknika kaj milita.

Daŭrigota...

Elektio de LEA/G-estraro...

ne estis ebla dum kunveno, klun ni intencis aranĝi kadre de la SAT-Amikara kongreso en Chambéry lastan paskon, ĉar mankis partoprenantoj el Germanio. Pro tio la asocia statuto permesas voĉdonon per *Referendumo*.

Tio: nur faras sencon, kiam inter la aktivaj membroj estas kelkaj, kiuj pretas transpreni taskon. Bedaŭrinde ni ne trovis tiajn aktivulojn.

Mi proponas, ke la ĝisnuna estraro restu ĝis ni trovos eblecon, aranĝi kunvenon, eble venontjare.

Aktivaj membroj, kiuj estas kontraŭ ĉi tiun decidon, bv. protesti perletere ĉe la estraro (*Adreso: Freier Esperanto-Bund, Renchenner Str.47, 77704 Oberkirch*) Ni diskutos pri tiaj protestoj pere de *MAGAZINO*.

A.F.Stephan, 1-a prezidanto

Enhavo:	paĝo
Grammatik auf 5 x 9,5 cm	1
Zwischenruf – Interropa voko	2
Bastono kun ŝnuro en akvo <i>Paco estas en la koro (L.R.Stilling)</i> <i>Apemotoj</i>	3
„Kio estas la amo?“ (<i>Kuffelwascher</i>)	4
<i>Aĉetu SAT-Akciojn!</i>	5
<i>Kato kaj muso</i> (rakonto)	6
Esperanto lebt... (el gazeto) <i>Deziras korespondi...</i> <i>diversaj informoj</i>	7
<i>Kaŝitaj vortoj</i> (enigmo)	8
<i>Prusio ne allogas (R.Schnell)</i> (daŭrigo)	9 10
<i>Naciaj limoj utilas al akciaj kurzoj...</i> (daŭrigo) (<i>tradukis R.Schnell</i>)	10 11
<i>Tia estas la mondo (de H.Helne)</i> (<i>esperantiĝis Manfred Retzlaff</i>)	11
Recenzo „ <i>La familio Zamenhof</i> “ (<i>Zofia Banet-Formalowa</i>)	12
Novaĵoj – Esperanto en dir.Aktion	12
Naturista Vivo – „Ĉu la haŭto estas vesto?“ (<i>Roger Colney</i>)	13
(daŭrigo)	14
<i>SAT-kongreso en Hungario</i>	14
<i>Düsseldorf esploras E-historion</i> (<i>Edeltraut Mattusch</i>)	15
La Socialisto – Sieger u.Sprachen (daŭrigo paĝo 19)	16
<i>Informoj de la LEA/G-Estraro (INFO-1 k.2)</i> <i>Diversaĵoj, Elekto de LEA/G-estraro. 19</i> <i>Unser Weltbummler H.Jankowski</i>	20



Unser Weltenbummler Hans Jankowski...

besuchte die Esperanto-Freunde in Nepal. In der Hauptstadt Kathmandu bei der Nepal Esperanto-Vereinigung ist er ein gern gesehener Gast. Hans liefert den Beweis, daß man mittels der internationalen Sprache Esperanto überall in der Welt Freunde hat.

Mittlerweile zeigt der Esperanto-Kurs für Anfänger in Kathmandu Erfolg, wie Jankowski feststellte. Selbst auf der Straße ist er schon angesprochen worden – er trägt gut sichtbar unseren grünen Stern auf der Jacke :-

„Vi estas esperantisto, ĉu ne?“

Hans kann noch über viele weitere Treffen mit Esperantosprecher auf diesem Globus erzählen. Er macht es richtig: Besichtigt die Welt fast ohne Sprachschwierigkeiten, denn er spricht die neutrale Sprache Esperanto.

Ĉu vi scias, ke...

SAT ne estas politika partio, sed starigo de frakcioj estas ebla se troviĝas sufiĉe da interesatoj pri sama ideo kongrua kun la SAT-celoj: Anarklistoj, Distribuaj Ekonomio, Ekologio, ISF-Socialistoj, Liberpensuloj, Naturismo, Pacismo..